

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

Oomoto

n-ro 459
2012
jan.-dec.



Enhavo

Memora Entrepreneo por la 120-jara Jubileo de la Fondiĝo de Oomoto.....	3
Karavano de EPA vizitis la Centron de Kaodaismo kaj okazigis fakajn kunsidojn okaze de la 97a UK en Hanojo, Vjetnamio.....OKUŬAKI Toŝiomi	5
La ekhisa ceremonio okazis por triopa standardo de Oomoto, UHA kaj EPA en Kameoka.....	9
Oomoto kaj Arto kontribue al la 120 jaroj de la fondiĝo de Oomoto..... TANABE Kenĝi	9
La organiza deklaro kontraŭ la refunkciigo de la nuklea centralo de OOI.....	11
Triopo el Mongolio havis intensivan lernadon pri Oomoto kaj UHA en junio.....	12
Tre ĝoje realiĝis la adorvizito al Oomoto kun du miaj malnovaj amikoj..... Deshigsuren GANBAATAR	13
Tra Pollando iras forta voko.....Etsuo MIYOSHI	15
Mia vizito al Ŭonbulismo en Koreio.....SAITO Jasutka	18
La 5-a Esperanto-Kurskunveno de EPA en Kanto okazis dum tri tagoj en majo, 2012, kun 21 partoprenantoj el 4 landoj.....	21
La Transjara Kurskunveno de EPA, 2011-2012, kun 51 partoprenantoj el 5 landoj.....	21
NAO DEGUĈI, biografio de la Fondintino de Oomoto (3).....OOIŜI Sakae tradukita de Mathias DALMOSE	22
KONVINKIĜO de VIVĜOJO (kvina parto) KIO ESTAS VERA "MI" ? (1)..... verkita de DEGUĈI Hidemaru, tradukita de ITOO Eizo	27
Nun, la DVD estas atente rigardata de e-istoj en monda Esperantujo!.....	33

Oomoto

Oficiala organo
de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai
(Universala Homama Asocio UHA)
Internacia Fako de Oomoto,
Ten'on-kjo, Kameoka-ŝi,
Kioto-hu, 621-8686 Japanio

Telefono: + 81(771)22-5561
Telefakso: + 81(771)25-0061
E-mail: oficejo@epa.jp
Hejmpaĝo: [http://www.oomoto.or.jp/
Esperanto/index-es.html](http://www.oomoto.or.jp/Esperanto/index-es.html)

Fondita en 1925

Numero 459, 2012 januaro-decembro
Administranto: AGOU Takaŝi
Kunredaktoro: HAZAMA Hiroto
Redaktoro: OKUŬAKI Toŝiomi

La kovrilo: Ŝinkjoo-den en Kameoka

Memora Entrepreno por la 120-jara Jubileo de la Fondiĝo de Oomoto

Finkompletiĝis la konstruaĵoj cele al "Oomoto por la mondo"



Antaŭ la Granda Kursejo la ornamita rubando estas eltranĉita memore al la plena kompletiĝo fare de la manoj de la Majstrino DEGUĈI Kurenai kaj aliaj reprezentantoj.

La 4-an de decembro en 2011 plene kompletiĝis la granda ekskulziva aŭditorio de Oomoto, kiu estis unuafoje konstruita kiel la Granda Kursejo de Oomoto post la fondiĝo de Oomoto.

Okaze de aprila monata festo de Ten'onkjo, en Kameoka, ĝia finkompletigita raporto al Dio kuncelebriĝis fare de la ĉefpastro en la preĝejo Banšoo-den kun 655 adorvizitantoj.

Post la rita ceremonio sekvis elvualigi la ŝildon de la Granda Kursejo, aŭtografiita

de la Majstrino DEGUĈI Kurenai, la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto. Kaj la ornamita rubando estis unuanime eltranĉitaj mane de la Majstrino DEGUĈI Kurenai kaj aliaj reprezentantoj memore al la plena kompletiĝo de la Granda Kursejo de Oomoto.

Multaj adorvizitantoj, kiuj kolektiĝis de lokoj proksimaj kaj malproksimaj el la tuta lando, sentis sin feliĉaj, rigardante ĝian belan kaj puran aspekton tra la tuta tago.



Dum la kompletiga celebros plenumiĝas la puriga rito.



La Majstrino DEGUĈI Kurenai, la Spirita Gvidantino la ŝildon elvualigis desur la nomtabulo de la Granda Kursejo de Oomoto.



La Oomoto-Kursejo unuafoje finkompletiĝis ekde la fondiĝo de Oomoto. La 4-an de decembro en 2011 ĝia kompletiga festo celebriĝis en la preĝejo Banśoo-den kun 655 ĉeestantoj okaze de la monata festo de Ten'onkjo en Kameoka.



Sud-norde troviĝas la koridoroj.



Ene de la Kursejo estas ekipita la projekciilo.



Memorfotiĝo de la grupo ĉe nekovrita koridoro.

Karavano de EPA vizitis la Centron de Kaodaismo kaj okazigis fakajn kunsidojn okaze de la 97a UK en Hanojo, Vjetnamio

La Karavano de EPA adorvizitis la Centron de Kaodaismo kaj partoprenis en la 97-a UK, ekde la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto, 2012 en Vjetnamio.

Vizito al hela preĝejo

En la 26-a de julio, ptm. nia karavano kun 12 oomotanj e-istoj atingis la urbon Ho Chi Minh en Vjetnamio, kie s-ro Anh Phong Tan Phan varme bonvenigis nin. Li estis studento pri sociologio en la universitato Kobe.

Dum lia restado en Japanio li kelkfoje adorvizitis la Oomoto-Centron kaj ĝian regionan centro en Kobe okaze de la Kvar Grandaj Festoj kaj la Monataj Festoj. S-ro TABUĈI Jasuo, la karavanano, tre ĝoje revidis s-ron Anh Phong.

Akompanate de li, la karavano turismis kristanisman preĝejon kaj la centran poŝtoficejon ktp en la urbo. Survoje ni en la riveron Saigon, elfluigis la sanktajn akvojn "Tamasui (globo-akvo)" kaj "Kinmeisui (oroluma akvo)", kiujn ni ricevis de la majstrino DEGUĈI Kurenai, la Spirita Gvidantino de Oomoto.

En la 27-a de julio ni direktis sin al la urbo Tay Ninh, 100 kilometrojn for de Ho Chi Minh per aŭtobuso. Kiam ni alproksimiĝis al la sidejo de Kaodaismo, kredantoj vestitaj per religiaj kostumoj, aliĝis al ni por bonvenigo



Karavananoj kun kredantoj de Kaodaismo antaŭ la preĝejo "Soteidou"

kaj kune fotiĝis antaŭ la konstruaĵo de la publika bona asocio de Kaodaismo.

En la supera preĝejo "Soteidou (prapatra ĝarden-preĝejo)", en kiu la sankta objekto de "Unu Okulo" estas kultata, ni kune ofertis la preĝvorton "Amacu-norito". Post tagemeze, komenciĝis la taga preĝo fare de pli ol 200 kredantoj dum 90 minutoj kun multaj eksterlandaj vizitantoj.

Post tio ni kune memorfotiĝis antaŭ la vestiblo de la preĝejo. Kaj ni estis invitita al najbara manĝejo, kie ni ĝuis la tipajn vjetnamajn manĝaĵojn por la unua fojo.

Sekve ni estis gvidita al la sankta monto de Kaodaismo, "Batou-san (kapmonto

de maljuna virino)”. Tie sankta akvo senĉese fontas. Ĉiuj karavananoj ĝoje ĉerpis la puran akvon kaj adorvizitis la preĝejon, Kaodaismo de diino.

Krome ni vizitis la domon, kiu havas profundan rilaton kun la dua spirita gvidanto de Kaodaismo, la majstro Pham Cong Tac. Post nia pilgrimado ni havis la okazon verŝi la sanktan akvon de Oomoto kaj Kaodaismo en la rivereton Bankodon, recitante la preĝvorton “Amacu-norito”.

Nokte, s-ro Le Quang Tan kun lia malnova amiko, s-ro Nguyen Ngoc Hua, invitis nin al sia domo por regali nin per verpermanĝo. S-ro Le estis 84 aĝa kaj ĉefa sekretario por la antaŭa spirita gvidanto de Kaodaismo. Aliflanke, s-ro Nguyen estis la interpretisto de japana lingvo kaj vizitis la sanktejon de Oomoto en Ajabe en 1955 okaze de la monda kunveno de religiuloj. Li restis



Okaze de la tempo por tagpreĝo



Ni adorvizitis la preĝejon,
kie diino de Kaodaismo estas apoteozata.

dum longa tempo en Japanio post sia edziĝo al japanino.

S-ro Le en sia bonveniga saluto akcentis la gravecon de la fondiĝo de la monda religia federacio, deklarita de la majstro DEGUĈI Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto en 1925. Kaj li montris al ni la deziron organizi sian karavanon al Oomoto en 2013, kondiĉe ke la politika cirkonstanco favoros al si.

Por esprimi nian dankemon s-ro TABUĈI Jasuo, eminenta je “Aŭa-danco”, iniciatis ekdanci, akompanite de ses karavaninoj antaŭ la gastigantoj. Fine de la bankedo ni vigle kantis la himnon de Oomoto “Fundamenta misia kanto” en japana lingvo, kiu vigle sonis tra la nokto.

Inter la karavananoj troviĝis s-ino TARUI Acuko, kiu estas la filino de s-ro KAKEHI Kijozumi. Li vizitis kiel la unua Oomotano, la sidejon de Kaodaismo, nome



S-roj Le Quang Tan (centre), Nguyen Ngoc Hua (maldekstre) kaj s-ino TARUI Acuko

de Oomoto en 1935, ricevinte la ordonon de la majstro DEGUĈI Hidemaru, la Tria Kungvidanto de Oomoto, por kunlabori kun Kaodaismo. Ŝi parolis pri lia epizodo, kiamaniere li bonorde atingis la sidejon, transirante la densan arbaron, en kiu vivis rabobestoj.

Vjetnamio estis unuecigita en 1975 kiel la socialisma lando. En la komenco la nova registaro intencis elpeli la religion. Pro tio la aktivado de Kaodaismo estis malpermesita. Plie, multaj instalaĵoj de Kaodaismo estis konfiskitaj kaj samtempe la pastroj estis nemal multe arestitaj same kiel Oomoto estis antaŭ la 2-a mondomilito.

La 97-a UK en Hanojo

Post la vizito al Kaodaismo ni veturis al Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamio per la enlanda aviadilo posttagmeze en la 28-a de julio. Partopreninte en la inaŭgura ceremonio de la 97-a UK. atm. en la 29-a, ni ĝuis libere paroli kun alilandaj kongresanoj.

Okaze de tio, la vicprezidentino de Vjetnamio, Nguyen Thi Doan varme bonvenigis la kongresanojn. Najbare de kongresejo multaj verdaj standardoj flirtis ĉe la stratoj. Nokte, ni ĝuis spekti la tradiciajn dancojn kaj kantojn de Vjetnamio en nacia vespero.

Posttagmeze en la 30-a de julio, la fakkunsido de Oomoto okazis kun ĉirkaŭ 90 ĉeestantoj, inter kiuj s-ro Ganbaatar (mongolo) kaj Nguyen Thi Phuong (alinome Flama Floro, prezidentino de VEJO; Vjetnama Esperantista Junulara Organizo) parolis pri Oomoto kaj UHA.

Poste, la filmo, “Japana printempo — Oomoto 2009”, elfarita de s-ro Roman Dobrzynski, iama vicprezidentino de UEA, prezentiĝis kiel la unua premio de la Belartaj Konkursoj de UEA en la jaro 2011.

Ankaŭ prezentiĝis la luktarto “Ŭaraku”, kaj japana tradicia arto kiel la parto de nooa danco, nomata Ŝimajo “Seioobo” kaj psalma kanto de Oomoto “Oro”.

Vespere en la sekvanta tago, la fakkunsido de UHA unuafoje okazis kun ĉirkaŭ 70 ĉeestantoj kadre de UK post la 2a mondmilito. La unua, s-ro AGOU Takaŝi, la konstanta administranto de EPA, faris malferman saluton kaj parolis sub la temo “Kio estas UHA?”.

La dua, la filmo pri UHA prezentiĝis en Esperanto. Sekvis la paroloj de s-roj Bharat



S-ro Bharat Kumar Ghimire el Nepalo

Kumar Ghimire (ĝenerala sekretario de Nepala Esperanto-Asocio). Li oomotaniĝis, kiam li unuafoje vizitis la Oomoto-Centron en la lasta junio, 2012. Li menciis sian motivon aliĝi al Oomoto kaj UHA, kiuj internacie agadas por la mondpaco.

S-ro Enkhee Chimedtseren (prez. de Mongola Esperanto-Societo, mongola oomotano) prezentis la aktivadon de UHA en Mongolio. Post lia parolo, s-ro AGOU



S-ro Enkhee Chimedtseren el Mongolio

aldone klarigis pri la helpa organizo de EPA kaj Oomoto por la 6-a Azia Kongreso de Esperanto en 2009.

Sekve, mi prezentis la interreligian aktivadon inter Oomoto kaj Ŝonbulismo en Koreio pere de Esperanto.

Du aliaj paroloj plu estis. S-ro TABUĈI Jasuo prelegis sub la temo “Amo kaj preĝo”.

Parolis s-ro Dogsuren Khurelbaatar el Mongolio sub la temo “Mi kaj UHA”. Fine 4 karavaninoj ĉantis la tankaon (japana poemo) per Esperanto, kiun la Majstrino DEGUĈI Kurenai, la Spirita Gvidantino, faris, esperante estontan okazigon de la Esperanta Poemfesto de Oomoto.

Estis por ni granda ĝojo kaj honoro, ke ĉeestis la kunsidon multaj konatoj, inter kiuj troviĝis s-ro Renato Corsetti, la eksa prez. de UEA.

Posttagmeze, la 1-an de aŭgusto la



karavano vizitis kelkajn turismajn lokojn en Hanojo kaj survoje al la flughaveno post vespermanĝo, ni verŝis la sanktan akvon desur la ponto en la riveron Hon. Meznokte ni bonorde revenis al Japanio.

Mi aparte dankas al la oomotanoj kaj simpatiantoj el Mongolio kaj Vjetnamio pro iliaj multaj kontribuoj al niaj fakaj kunsidoj.

(OKUŬAKI Toŝiomi)

La ekhisa ceremonio okazis por triopa standardo de Oomoto, UHA kaj EPA en Kameoka

Antaŭ la Domo Miroku en Ten'onkjo, Kameoka vigle flirtadas en freŝa aero, la triopa standardo de Oomoto, UHA (Universala Homama Asocio) kaj EPA (Esperanto-Populariga Asocio) ekde la 1-a de majo.

Je 11:00 atm. en tiu tago okazis la ceremonio por ekhisi ilin kun la alesto de la Majstrino DEGUĈI Kurenai, la Spirita Gvidantino kaj 50 oomotanoj.

Kun la ĥoro "Fundamenta Misia kanto de Oomoto", kantita de 5 stabanoj el Internacia Fako de Oomoto, la standardo de Oomoto la unua hisiĝis mane ligita de la Majstrino DEGUĈI Kurenai.

La dua, tiu de UHA, akompanita de la kanto de UHA digne hisiĝis, kaj la lasta, la standardo de EPA, kun la kantado de "La Espero", atingis la pinton de la hisa stango, kiam ĉiuj ĉeestantoj ĝoje aplaŭdis, aparte



esprimante siajn dankemojn al la Majstrino DEGUĈI Kurenai, kiel la ĉefo de kvar hisantoj en la ceremonio.

Estas menciinde, ke la hisado de triopaj flagoj estis unuafoja okazintaĵo en la 120-jara historio de Oomoto. Ni elkore deziras, ke la agadoj de Oomoto, UHA kaj EPA unuanime prosperiĝu same kiel la vigla flirtado de triopaj standardoj en la 21-a jarcento.

Oomoto kaj Arto

Kontribue al la 120 jaroj de la fondiĝo de Oomoto

(Seria publikigo sur la Ĵurnalo Kioto)

Verkita de TANABE Kenĵi

La ĉefĝenerala Sekretario de la 120-jara memorentrepreno de Oomoto

Kaj en oriento kaj en okcidento multaj artaĵoj naskiĝis el religioj. Pentraĵoj, skulptaĵoj, muzikoj kaj konstuaĵoj... Estas nekalkuleble, ke la verkoj kreitaj de la

patrinaj korpoj kiel religioj.

Ankaŭ la religio "Oomoto", kies centraj oficejoj troviĝas en la urboj Kameoka kaj Ajabe, naskis diverskolorajn verkojn

mane faritajn de la sinsekvaj Gespiritaj Gvidantoj de Oomoto, konforme al ceramikaj artoj, kaligrafiaj-bildoj, teksaĵoj ktp.

Unu el la fundamentoj de Oomoto estas artkultura agado.

Ni prezentas la verkojn, koncernante Oomoton kunlige al la jaro 2012, kiam estas la 120-jara jubileo de la fondiĝo de Oomoto.

(1) Ceramikfarado de DEGUĈI Onisaburo
Deirpunkto de la kolorriĉaj ceramikaĵoj

La plej ĉefaj verkoj de la skolo DEGUĈI estas la krudaj ceramik-tebovloj faritaj de Onisaburo. Tamen, oni bezonis multe da tempo por rekoni ilin.

En 1926, Onisaburo komencis fari ceramikarton. En tiu septembro la eminenta noa komediisto, ŜIGEJAMA Sensaku, la 3-a generaciano de lia familio, kiel vivanta nacia trezoro, vizitis Ten'on-kjon, Oomoto-Centron en Kameoka, por ke li prezentu sian noan komedion. Poste li emocie rakontis sian epizodon.

“Vizitinte Oomoton kun mia patro, mi ricevis la tebovlon. Multaj el ili kaj kaligrafiaj pentraĵoj estis ekspoziciitaj en la ĉambro, kie mi renkontis la Majstron DEGUĈI Onisaburo.”

Septembre en 1929 konstruiĝis la ceramikarta laborejo kaj la vakejo por ekskluziva uzo de Onisaburo. Sed, ambaŭ konstruaĵoj estis komplete detruitaj kaj liaj ĉiaj agadoj estis devigitaj ĉesi, ĉar tiama japana registaro subpremis Oomoton de 1935 ĝis 1945.

Ĉe la fino de la jaro 1944 Onisaburo rekomencis fari tebovlojn. Preskaŭ ĉiutage li vizitis la domon de SASAKI Ŝooraku, kiu translokiĝis proksime al la domo de Onisaburo por evakui sin. Onisaburo verŝis sian tutan energion al la termaso kvazaŭ la magmo unuspire erupciiĝinta grandskale el la tero.

DEGUĈI Torao, kiu estis la edzo de la dua filino de Onisaburo, priskribis la staton de Onisaburo kiel jene.

“Li faris tebovlojn tiel fervore, ke li enspiris kvazaŭ sian tutan vivon al ili per ĉiufoja tranĉado kun profunda preĝo. (preterlaso) Kiam li ekkolorigis la tebovlon per lerta manipulado de la tuĉpeniko post lia klimaksiĝo, li pentris sendistinge de farbkoloroj per verdo, ruĝo, flavo, en nevidebla rapideco. Estis furioze, ke ĝi devus esti konvena por esprimi ne la pentradon, sed kvazaŭ la disĵeto al ĝi, elpreninte la kolorojn. Mi estis maltrankvila, rigardante lian laboron, tamen, kiam la bovloj estis bakitaj, iliaj koloroj estis plene puraj kun neniom da konfuziĝo.”

La kruda ceramiko "Rakujaki" sekvas tradician formaton, tamen, ĝis tiam neniu vidis tiel okulfrape freŝajn kolorojn sur ili. Tiamaniere, ne identigeblaj tebovloj nekonataj, ĉu veraj aŭ malveraj, elfariĝis sur la tero. Fakte, tiuj ĉi tebovloj kaj ilia famo poste disvastiĝis enlande kaj eksterlande.

(daŭrigota)

(Eljapanigita de AGOU Takaŝi)

La 14a de julio, 2012

Al: Ĉefministro de Japanio
S-ro NODA Joŝihiko

De: Reprezentanta Estrarano de la religia jura persono Oomoto
S-ro TAGA Norijuki

Laŭdire, la decido de la definitiva juĝo pri la refunkciigo de la nuklea centralo de OOI okazos en la 16a de junio, kaj nun la religia jura persono Oomoto sendas la organizan deklaron por forte kontraŭi al la refunkciigo.

La organiza deklaro kontraŭ la refunkciigo de la nuklea centralo de OOI

La religia jura persono Oomoto esprimas la profundan bedaŭron pro la refunkciigo de la nuklea centralo de OOI kaj forte kontraŭas ĝin.

La granda akcidento de la nuklea centralo de Hukuŝima (administrata de la elektra kompanio Tokio) kaj la postedaŭra polucio refoje sciigis al la popoloj la terurecon de la radioaktiva damaĝo.

Ni devas ne malpurigi per la radioaktiva substanco teron, akvon kaj aeron, kiuj nutras nian vivon. La radioaktiva substanco donas la grandan influon al la natura medio kaj ekologia sistemo, kaj ĝi minacas ne nur homojn, sed ankaŭ la "vivon" de ĉiu estaĵo. En la tertrema lando Japanio oni ne povas garantii ke plu ne okazos la akcidento de la nuklea centralo. La nuklea centralo povas esti produktaĵo el homa egoismo, deziranta pli kare trakti la ekonomion, ol homan vivon.

Nun, la religia jura persono Oomoto forte postulas, ke oni ne refunkciigu la nuklean centralon de Ooi.

Kaj ankaŭ la ceterajn atomcentralojn ne funkciigi, ni postulas.

Anstataŭe, ni deziras, ke oni alprenu la politikon, kiu forte antaŭenpuŝos la ekspluaton kaj la utiligon de la reprodukteblaj energioj, nedependaj de atomenergio.

En 1954, la religia jura persono Oomoto rezoluciis la proĥibon de la eksperimento pri la nuklea bombo kaj disvolvis la movadon por kolekti la signaturojn kontraŭ la eksperimento. Ekde 1999, Oomoto antaŭenpuŝis la agadojn por respekti "homan vivon", t.e. la agadon por kolekti la signaturojn kontraŭ la cerbmorta organgrefito sub la slogano "Cerbmorto ne estas homa morto", la agadon por alvoki la danĝeron de manĝaĵoj, gen-rearanĝitaj, kaj la agadon por postuli la indikon sur tiuspecaj manĝaĵoj. Ni konsideros ĉi tiun energian problemon kiel nian propran, repripensos kaj ŝanĝos la ĉiutagan vivmanieron, kaj klopodos por la konstruo de tia socio, en kiu la vivo de ĉiu homo estos respektata.

(Eljapanigita de MAEDA Ŝigeki)

Triopo el Mongolio havis intensivan lernadon pri Oomoto kaj UHA en junio

De la 1-a ĝis la 4-a de junio, triopo el Mongolio, gvidite de s-ro Deshigusuren Ganbaatar, la ĝenerala sekretario de Mongola Esperanto-Societo (MES), vizitis la Centran Oficejo de Oomoto, Kameoka por intensive lernadi la instruojn de Oomoto kaj UHA.

Post la alveno, la 1-an de junio, ili gvidiĝis sur la tuta tereno de Oomoto, kaj ĉeestis en la vesperpreĝo, okazinta en la preĝejo Banŝoo-den.

La 2-an de junio, ili havis okazon sinprezenti al la laborantoj de la CO. okaze de la ĉiumatena kunveno, kaj poste vizitis la oficialajn domojn de la Spirita Gvidantino de Oomoto, Ĉoojoo-kan kaj Baiŝoo-kan, kie la Majstrino DEGUĈI Kurenai bonvolis rekte saluti ilin, malgraŭ ke ŝi estis tiam tre okupita por tuj ekiri al la urbo Ajabe, la naskiĝloko de Oomoto.

Post la tagmanĝo en la nova konstruaĵo "Domo de Miroku", ili ekhavis la lecionon de Oomoto kaj UHA, aprecante la videofilmon, titolitan "Japana printempo — Oomoto 2009", kiun reĝisoris s-ro Roman Dobrzynski en Pollando, la eksvicprezidanto de UEA, gajninte la unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA en 2011 por la filmo.

Du el ili, nome s-roj Dorjsuren BATDORJ kaj Jumbuudei BAYANZL, estas



S-ro Deshigusuren GANBAATAR (centre) kaj du amikoj; s-roj Dorjsuren BATDORJ (dekstre) kaj Jumbuudei BAYANZL (antaŭ la kavo de la monto Takakuma)

komencantoj de Esperanto kaj malnovaj amikoj de s-ro GANBAATAR, kiu iniciatis triope viziti Oomoton, oficiale membrigante al la Mongola Centro de Oomoto en pasinta aprilo.

La 3-an de junio ili adorvizitis la preĝejon Ĉoosej-den, Ajabe, por la monata ceremonio kaj post la rito ili, kiel la mongolaj lernantoj pri Oomoto, estis aparte prezentitaj de s-ro KANAKOGI Tokio, la estro de la rita centro de Oomoto en Ajabe. Reprezentante la triopon, s-ro GANBAATAR faris parolon al 130 adorvizitantoj japanaj, kun aparta mencio pri la 87-jara jubileo de la fondiĝo de UHA.

En la 4-a de junio ili estis akompanita de s-ro OKUŬAKI Toŝiomi, la membro de EPA-oficejo, al la sankta monto Takakuma, kaj antaŭ la kavo, kie nia Majstro DEGUĈI

Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto havis unu semajnan asketismon. Ili sentis al si tre freŝigitan sencon post la recito de la preĝvortoj “Kamigoto” antaŭ la altaro.

Posttagmeze, ili direktis sin al Kioto por ĝui mallongan turismon kaj vespere atingis la Internacian Flughavenon Kansai por morgaŭa frumatena ekflugo per korea

Parolo post la monata ceremonio en Ajabe, la 3an de junio, 2012



Tre ĝoje realiĝis la adorvizito al Oomoto kun du miaj malnovaj amikoj

Deshigsuren GANBAATAR (Mongolio)

Okaze de la 87-jara jubileo de la fondiĝo de Universala Homama Asocio (UHA), mi elkore gratulas vin nome de mongolaj oomotanoj kaj esperantistoj.

Estas granda ĝojo kaj plezuro por mi ĉi-foje viziti vian belan landon ankoraŭfoje, kaj saluti vin kun miaj du amikoj el Mongolio. Fakte, 14 jarojn antaŭe, mi unufoje havis okazon viziti Japanion por Esperanta evento. Tiam, mi pasigis tre agrablan tempon neforgeseblan.

Mi eklernis Esperanton en 1993 sub la gvido de nia karmemora antaŭa profesoro Ĉimid DOGSUREN. Tiam, de tempo al tempo mi aŭdis pri Oomoto, ĉar mia instruisto DOGSUREN havis kontaktojn kun japanaj oomotanoj kaj poste estis tradukinta la faman libron de la Tria Kungvidanto de Oomoto, estimata DEGUĈI Hidemaru, titolitan “Esplorado de vivĝojo” en la mongolan

lingvon.

Danke al Dio kaj aparte al la gvido de la Majstrino DEGUĈI Kurenai, alte estimata Spirita Gvidantino de Oomoto, pli kaj pli prosperiĝas la agadoj de Oomoto, Universala Homama Asocio kaj Esperanto en Mongolio.

Mi kaj aliaj 10 oomotanaj e-istoj kredas, ke la celoj kaj principoj de Esperanto kaj Oomoto mirinde kaj harmonie koincidas unu kun la alia. Ekzemple, ni multe impresiĝis je la devizo de Oomoto: Unu Dio; Unu Mondo; Unu Interlingvo.

Alie, Oomoto instruas tiel ke ĉiuj religioj originas el la sama fonto. Ni opinias, ke tiu ĉi instruo multe kongruas kun mongola tradicia ĉiel-adora religio kaj Budhismo.

Mi deziras esprimi al vi tion, ke en proksima estonto mi kaj miaj samideanoj senĉese klopodos por realigi sanktajn celojn de Oomoto, UHA kaj Esperanto: la tuta

homaro fariĝu gefratoj sub la graco de Dio, kaj efektiviĝos la ideala mondo, nomata "Miroku-no-jo" sur la tero.

Fakte, delonge antaŭe mi revis viziti la naskiĝlokon de Oomoto, kaj profunde apreci la sanktajn terenojn per miaj okuloj. Tio estis nia celo ĉi-foje veni al Japanio. Hodiaŭ, ni tre multe ĝojas kaj impresiĝas pro tio ke nia revo admirinde realiĝas en bona ordo.

Nia Mongola Esperanto-Societo kaj via Esperanto-Populariga Asocio (EPA) havas intiman rilaton laŭ nuna historio. Kiel vi jam bone scias ke du jarojn antaŭe mongolaj esperantistoj sukcese okazigis la 6-an Azian Kongreson de Esperanto en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio kun 254 aliĝintoj el 33 landoj sur 4 kontinentoj de la mondo.

La nombro de aliĝintaj landoj estis rekordo laŭ la historio de Azia Kongreso. Kaj dank' al la kongreso Mongolio estis internacie bone prezentita al la mondo pere de nia kara komuna neŭtrala lingvo, Esperanto.

Tiam, de la komenco ĝis la fino de la kongresa organizo la reprezentanto de EPA, Oomoto kaj UHA, multe helpis kaj kontribuis sian energion al ni, loka kongresa preparkomitato. Plej grave estis ke nur el EPA kaj Oomoto ĉirkaŭ 40 esperantistoj solidare partoprenis la Azian Kongreson kaj sukcese okazigis la fakkunsidojn de Oomoto kaj UHA. Tio ja estis granda kontribuo por la kongreso.

Mi kredas ke mongolaj e-istoj neniam ĉesos kunlabori kun Oomoto, UHA

kaj EPA. Ekzemple, nun en la Mongola Centro de Oomoto la membroj de MES ofte kolektiĝas okaze de la monataj ceremonioj kaj Esperanto-renkontiĝoj, kunlabore kun s-ro KIMURA Kacuĵa, nuna deĵoranto de Oomoto kaj UHA.

Nun mi havas pli da kuraĝo, konfido kaj entuziasmo labori kiel la plej nove vakita oomotano en Mongolio, kaj ĉar mi surloke sentas al mi la esencon de la spirito de Oomoto, danke al Oomoto-sume-oomikami-sama kaj la Majstrino DEGUĈI Kurenai, Kĵooŝu-sama, kiu volontis rekte saluti al ni okaze de nia adorvizito al ŝia oficiala domo Baiŝoo-kan, hieraŭ matene, malgraŭ ke ŝi tiam estis okupita de sia sankta misia laboro.

Ni triopo profunde sentis nin elkoran dankemon al Kĵooŝu-sama pro ŝiaj vastama kaj varma koroj. Elkore dezirante ŝian daŭran gvidadon por precipe mongolaj oomotanoj, mi finas mian parolon.

Koran dankon pro via atenta aŭskultado!

Tra Pollando iras forta voko

Etsuo MIYOSHI

Okaze de la 125-jariĝo de Esperanto kaj por omaĝi ĝian patrujon mi prelegvojaĝis tra 8 urboj en Pollando (Gdańsk, Sopot, Gdynia, Varsovio, Vroclavo, Bjalistoko, Lodzo kaj Lublino) dum 3 semajnoj en majo ĉijare.

La membroj de EDE-PL, Edward Kożyra kaj Kazimierz Krzyzak, planis renkontiĝojn kun politikistoj en Sopot kaj Varsovio.

En Sopot mi konatiĝis kun Prof. Edmund Wittbrodt, vic-prezidanto de la Pola Senato. Li estas mirinde entuziasma pri Esperanto kaj ĝia enkonduko en la eduksistemon. Dum renkontiĝo kun li kaj la Eŭroparlamentano Jan Kozłowski, ĉilasta asertis, ke multaj Eŭroparlamentanoj ne kredas pri la venko de Esperanto. Bedaŭrinde mi konstatis, ke ankaŭ multaj Esperantistoj same kredas.

La ĉefa agado en Varsovio estis renkontiĝoj ĉe la Parlamento. La vic-marŝalo de la Senato, Jan Wyrowiński kune kun senatanoj Ryszard Górecki, Stanisław Iwan, Kazimierz Kleina, Waldemar Kraska kaj Edmund Wittbrodt akceptis min kaj tiuokaze mi ricevis Senatan Medalon pro mia laboro por la diskonigo de la pola kulturo kaj Esperanto.

Sekvatage mi estis ĉe la Sejmo, kiam mi renkontis la Vic-prezidenton Jerzy

Wenderlich kaj sejmanon Romuald Ajchler. Interesa fakto estas, ke la patrino de la unua estas Esperantisto kaj la dua mem iom scipovas Esperanton.

En la hejmpaĝo de la Senato kaj tiu de Prof. Wittbrodt aperis pollingvaj raportoj pri ambaŭ eventoj.

En Bjalistoko mi estis kortuŝita, ĉar la vic-urbestro Alexander Sosna, sincera apoganto de la Esperanto-Movado, invitis min al tagmanĝo en kafejo Esperanto. Poste, li partoprenis mian prelegon en la sidejo de Bjalistoka Esperanto-Centro.

En Lublino la agendo estis plena je vizitoj al politikistoj danke al la kontaktoj de Prof. Witold Stępniewski. Mi renkontis la jenajn membrojn de la Sejmo: Jan Łopata, Lech Sprawka (eksa ministro pri edukado) kaj Krzysztof Michałkiewicz (eksa ministro pri laboro kaj sociaj aferoj) kaj la eŭroparlamentanon D-ro Mirosław Piotrowski.

Inter la argumentoj, kiujn mi uzis por persvadi ilin estis, ke 700,000 EU-studentoj ĉiujare lernadas la anglan en Britio kaj pagas ĉirkaŭ 20 miliardojn da eŭroj, sed neniel atingas la nivelon de denaskaj parolantoj kaj tial perdas multajn eblecojn pri laboro, ne nur en Bruselo, sed tutmonde, ĉe internaciaj organizoj.

Plie, mi menciis, ke la enkonduko de euroj en EU bezonis tutan jaron en 2002. Ene de 3-4 jaroj, ĉiu EU-ano povus regi Esperanton. Eĉ azianoj kaj arablingvanoj en la dua generacio denaske parolos Esperanton kaj iliajn lingvojn senpene kiel en Indonezio. Sukarno lanĉis la indonezian komunan lingvon kun helpo de lingvistoj. Ĝi estis devige instruata dekon da jaroj kaj nun 240 milionoj da homoj parolas ĝin kaj ĉ 700 insulajn lingvojn senpene por la gepatroj. Same okazis pri la kataluna, hebrea kaj norvega.

Iam la familio de mia filino loĝis en Ĉinio. Kiam ŝi revenis al Japanio, ŝi portis sian katon. Tiu amikiĝis kun japana katino komunikante per internacia kata lingvo kaj naskiĝis ĉarmaj infanoj. Ni haltigu la sensangan lingvan militon!

Inter la 750,000 loĝantoj de Lodzo estis 800 Esperantistoj antaŭ 20 jaroj, dum la revolucio. Dekoj da ili ekskabeiĝinte venis al miaj prelegoj. Mi pensas, ke se la pola registaro varbas Esperanto-instruistojn, miloj da ili volontulos. Se mil Esperantistoj instruos 50 homojn, 1 jaron poste oni bakos 50,000 Esperantistojn.

Ĉiuj atentoplene aŭskultis min, konsentis pri tiu enorma lingva diskriminacio kaj pretas agi por ŝanĝi la situacion.

En Pollando estas ja vastaj eblecoj por nia lingvo: la popolo ĝenerale konas, kio estas Esperanto, miloj da Esperantistoj estas en la lando kaj politikistoj apogas la Movadon.

Necesas tamen ĉiam resti pacienca kaj akceptema. Pasintjare mi suferis antaŭ



S-ro Miyoshi ricevis la medalon.

la ricevo de ordeno de la Pola Registaro: cunamo okazis kaj la japana registaro ne respondis pri mia persono al la pola registaro. Longe mi atendis informojn por scii, ĉu iri aŭ ne. Nur 2 tagojn antaŭe mi povis findecidi ĉion. Ankaŭ dum mia prelegvojaĝo, politikistoj subite kelkajn tagojn antaŭ mia alveno nuligis la renkontiĝojn. Obstina klopodo estis grava, ĉar lastmomente ĉio solviĝis.

Mi estas konvinkita, ke se politikistoj, amaskomunikiloj kaj gejunuloj kunlaboras, ni povas faligi la lingvan muron, same kiel falis la Berlina.

Ĉu vi konscias, ke de jam kelkaj jardekoj en la mondo ni travivas lingvan militon? Dum ĝi oni ne mortigas homojn, sed lingvojn kaj kulturojn. Ĉiun dekan tagon mortas unu lingvo! Ekzemploj de forpasintaj lingvoj estas la kakadua, la manksa, la tasmanska, ktp.

British Council (Brita Konsilio) estis kreita por promocii la britajn interesojn, i.a. vaste diskonigi la anglan lingvon per ĝia instruado tutmonde. Ilia jara buĝeto

estas EUR 549 milionoj, ili disponas pri 4.2 milionoj da instruistoj kaj en 1 jaro okazigis 2.5 milionojn da ekzamenoj. Bv kalkuli mem kiom da mono ili ricevis: averaĝa ekzameno kostas EUR 200 x 2 (ĉar almenaŭ 2-foje necesas pasi ilin por atingi altan nivelon) = EUR 400 = EUR 680 milionoj. Ili ja akiras grandan profiton kaj sklavigas la mondon.

Interese estas, ke en 2004 la brita registaro deklaris, ke ili ne plu bezonas lerni fremdajn lingvojn oficiale. Tio estas venkodeklaro fine de lingva milito. Dum preskaŭ 2 jaroj mi plendas Facebook-e pri la lingva malegaleco angle, Esperante kaj france. Ĉu koincide aŭ ne, post reveno de Pollando, la 22-an de junio, 2 tagoj post mia diskonigo pri la miskonduto de la brita registaro, ili



Kun la vicprezidanto de la pola senato

anoncis oficiale, ke ilia lingvopolitiko estos ŝanĝita ekde 2013.

Per Facebook mi atingas 19,326 personojn kaj en mia blogo estis jam 13,275 vizitantoj. Pli ol 10 reprenas miajn tekstojn al iliaj muroj kaj eĉ la ĵurnalisto Ana Karen Bustamente tradukas hispanen miajn

tekstojn.

En ĵurnalisma grupo kun 640 membroj, iu plendis pri miaj opinioj kaj devis interveni la gvidanto, Elisabeth Hachet, por klarigi, ke opiniojn oni ne cenzuru. En alia grupo kun pli ol 2,000 membroj, la gvidanto Guy Deffeyes, komplete forigis min la 10an de aŭgusto 2011 post mia plendo pri la konduto de Le Monde. Malgraŭ miaj provoj reeniri la grupon, li ignoris min.

Ĉimonte dum kelkaj tagoj mi ne rajtis enmeti fotojn. Eble tiel Facebook deziris puni min, ĉar verŝajne mi iĝis danĝera homo (kun danĝera lingvo). Tio klare montras, ke ankoraŭ nun iuj pensas, ke la regado de la angla estas bona, ke oni ne povas egaligi la homaron kaj ke alies opinio ne estas akceptinda. Bedaŭrinda mondo! Tio tamen estas bona, ĉar ĝi signifas, ke ili serioze atentis. Ju pli ili premos, des pli granda poste estos la eksplodo.

En mia lasta tago de la restado en Varsovio, antaŭ la tombo de Ludoviko mi preĝis por ricevi forton de Dio kaj li por plu labori por la fina venko.

Al prof. Edmund Wittbrodt mi proponis celebri la Eŭropan Tagon de Lingvoj, la 26-an de septembro, en la Parlamento mem. La 6-an de julio li entuziasme respondis jese al mia propono. Tiam ni havos simpozion kaj ekspozicion pri Esperanto. Invititoj estas politikistoj, ĵurnalistoj kaj kompetentaj kaj junaj Esperanto-aktivuloj.

Poloj, do, montru la vojon al la Eŭropa Unio, ĉar per Esperanto, naskita tie, eblas solvi la lingvan problemon!

Mia vizito al Ŭonbulismo en Koreio

SAITO Jasutaka

“La 7-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado” okazis en sankta tereno de Ŭonbulismo, Iksano en Koreio. La duajara lernanto de Bajŝoo-ĵuku, Akademia Lernejo de Oomoto, s-ro SAITO Jasutaka sola vizitis Koreion de la 8-a ĝis la 12-a de januaro, 2012 por partopreni en ĝi. La vojaĝo al eksterlando estis unuafoja por li. Jen estas lia raporto pri lia vojaĝo al Esperantujo.

Ĉi-jare partoprenis en “Internacia Esperanto-Renkontiĝo” 34 Esperantistoj el Koreio, Tajvano, Rusio, Rumanio, Hungario, Usono kaj Japanio. Po unu persono el 6 landoj krom Koreio partoprenis. Sume 7 gvidantoj prelegis pri instruoj de Ŭonbulismo, Esperanta movado en la mondo kaj aliaj temoj.

Komenco de Renkontiĝo

Matene en la 9a, la Renkontiĝo komenciĝis en la sanktejo de Ŭonbulismo kaj mi vidis tiel belan arbaron de pinoj kiel tiun en la sanktejo de Oomoto, en Kameoka,



Aŭdienco kun la eksa ĉefmajstro de Ŭonbulismo

Japanio. Unu post alia Esperantistoj venis kaj alparolis min.

Poste, per aŭto ni veturis kaj promenis ĉirkaŭ “Templo Miroku”, kiu estas ruino de la regno Bajekje. Ni pasigis la tempon plezure, ĉar ni vizitis la 4-an Ĉefmajstron de Ŭonbulismo.

Posttagmeze, ni havis la inaŭguron. S-ro Avo, Ŭonbulano,

prezidis la Renkontiĝon, parolante tre flue. Poste ni havis prelegojn. La unua preleganto, s-ro Ŭon Ikson, parolis pri “Unu Vero, Unu mondo”. Post promenado kaj vespermanĝo, ni havis la programeron “Interkona vespero”. Ĉiu partoprenanto prezentis sin unu post la alia, intertempe prenante kukojn.

Poste, ni havis la lekcion “108 riverencoj”. Ni stariĝis kaj sidiĝis 108 foje antaŭ la altaro laŭ la gvido de la gvidanto. Kiam mi aŭskultis vortojn voĉlegatajn, mi sentis kvazaŭ mi aŭskultus la instruojn de Oomoto. Silente mi retrovidis hodiaŭon.

Diversaj Programeroj

La 10an tagon mi vekiĝis frumatene. Mi havis tempon de meditado kun partoprenantoj dum 30 minutoj samkiel ni Oomotanoj faras “Ĉinkon”. Dum la

meditado, Ŭonbulanoj neniel moviĝis krurkruce, fermante siajn okulojn. Post matenmanĝo ni ricevis du prelegojn. Post tagmanĝo kaj promenado, s-ino Kristalo

instruis al ni la kuirmetodon “koreajn putkukojn”. Ni tostis, manpreninte makolion. Nokte s-ro Kevin, Tajvano prelegis. Li plezure raportis



al ni pri renkontiĝo inter koreaj kaj tajvanaj Esperantistoj. Kiel kutime ni faris “108 riverencoj”-n fine de la tago.

Antaŭtagmeze en la 11a, ni tralernis same kiel hieraŭ, kaj per aŭtobuso veturis al diversaj famaj lokoj: vastega fragmitejo riverborda de rivero Kumgan, birdobservejo, etna muzeo kaj aliaj. Tie kaj ĉi tie, ni fotis reciproke. Revenvoje ni manĝis bongustan kuiritaĵon en kaserolo en manĝejo.

La tenereco de koreaj Esperantistoj

Reveninte al la centra domo, ni faris la “108 riverencoj”-n. Kaj ni pasigis lastan nokton kun la geamikoj. F-ino Klara kaj ŝia patrino demandis min pri multaj aferoj kaj inverse mi demandis ilin. Klara ŝatas lingvojn kaj eklernis Esperanton por mondpacu. Ŝi povis paroli ankaŭ la japanan lingvon iomete.

Mia kapablo de Esperanto preskaŭ egalas al ŝi. La tempo pasis tre rapide. Poste ili diris al mi “Bonan nokton!” kaj iris al sia ĉambro.

Kiam mi pensis ke la Renkontiĝo finiĝos morgaŭ, sola reaperis Klara, havante sian vortaron. Ŝi diris “Mi estas ĉagrena.” Mi demandis kial ŝi estas ĉagrena kaj ŝi diris, “Mi volas diri lastan “Bonan nokton!” Sed mi ne povas eltrovi la vorton.” Kredeble ŝi pensis ke morgaŭa adiaŭo estas bedaŭrinda. Mia penso ankaŭ estis sama kiel ŝi.

Reveninte al mia ĉambro, mi enlitiĝis. En la sama ĉambro s-ro Avo komencis rakonti serene. Ĉar li estis okupita pro lia prezidado, ni ne povis interparoli sufiĉe. Tamen li zorgis solan japanan junulon ekde la renkontiĝo en la flughaveno.

“Ŝajnas al mi, ke vi povis havi amikojn per Esperanto. Do, tiu ĉi Renkontiĝo sukcesis por vi. La partoprenantoj nun amikiĝas kaj bedaŭras adiaŭon.

Kaj, kiam ili renkontiĝos denove ie, ili pli interfratiĝos kaj ĝojos. Kiam vi havas alilandan amikon per Esperanto, lia filozofio venas al vi. Ekzemple kiam mi renkontas vin, via filozofio venas al mi.”

La Adiaŭa Tago

Ni faris lastan meditadojn matene en la 12a. Kiel matena kaj vespera preĝo en Oomoto, la meditadoj iom post iom igis la partoprenantojn havi amikecon kaj pacon en ilia koro.

Grave estis en Renkontiĝo ĉiam uzi Esperanton. Iu diris, “Kiam ni havis ĉi tian Renkontiĝon en la angla lingvo antaŭe, ni ne povis supervenki la baron. Sed Esperanto supervenkis la varon jam en la komenco.”

Mi sentas, ke ĝi estas prava. Kaj mirinde, kiam Esperanto diris ion pri la universala vero, la lingvo sonoris speciale bele. Ŝajnis al mi, ke mi trovis la admirindan

rolon, kiun Esperanto havas.

En la ferma ceremonio eksterlanda partoprenantoj diris la impresojn. Ankaŭ mi esprimis dankojn al ili, reprezentante japanon.

Fine ni vizitis la nunan Ĉefmajstron de Ŭonbulismo. Tie

reprezentantoj de partoprenantoj dankis al li pro Renkontiĝo. Ankaŭ mi dankis, dirinte, ke mi estas Oomotano. Antaŭ ol fino mi devis foriri al Japanio.



Dank' al pentraĵo de ŝi, mi povis sukcese manĝi Samgetan en flughaveno.

La 5-a Esperanto-Kurskunveno de EPA en Kanto okazis dum tri tagoj en majo, 2012, kun 21 partoprenantoj el 4 landoj



La 5-a Esperanto-Kurskunveno de EPA en Kanto okazis ekde la 18-a ĝis la 20-a en majo, 2012, en la Centra Oficejo de Oomoto en Tokio, organizita de Esperanto-Populariga Asocio (EPA) kun 21 partoprenantoj el 4 landoj. Inter ili troviĝis f-ino Jigjid Azjargal, mongola e-istino kaj la membro de Universala Homama Asocio(UHA).

Kiel unu el kvar klasgvidantoj, s-ino SATO Wienia, pollando-devena e-istino, lerte gvidis la konversacian klason, uzante diversajn lernomaterialojn. Ŝi estas tre eminenta ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri japanaj tradiciaj artoj, precipe pri la floranĝo kaj la te-ceremonio. Krom tio, s-ino HARA Hiroko, la japan-devena brazilano aliĝis al la kunveno, kiel la gasta parolanto de la kunveno. Danke al tiel riĉa internacieco ĉiuj kursanoj havis bona okazon ĝui la koncentran lernadon, firmigante la amikecon unu kun la alia en la kurskunveno de Esperanto.

La Transjara Kurskunveno de EPA, 2011-2012, kun 51 partoprenantoj el 5 landoj

La Transjara Kurskunveno okazis de la 30-a de decembro, 2011, ĝis la 2-a de januaro, 2012. El Nepalo, Koreio, Mongolio, Usono kaj Japanio, partoprenis 51 kursanoj, aparte 8 gvidantoj kaj 5 zorgantoj. Inter la kursanoj troviĝis 7 geknaboj japanaj kaj nepalanaj.



NAO DEGUĈI

Biografio de la Fondintino de Oomoto

3

Sakae OOĪŜI, *tradukis Mathias DALMOSE*

Agado post liberiĝo

Kiam Oocuki venis viziti Nao en ŝia ĉelo la 30an de majo, 1893, Nao trankvile sin turnis al li kaj diris ke se li povas efiki al ŝia liberiĝo, ŝi konsentos pri kion ajn li postulus. Je tiu tempo estanta en malfacila financa situacio, Oocuki konsentis liberigi ŝin se ŝi konsentos lasi lin vendi la domon de la familio Deguĉi. Do, en la kvardeka nokto de mallibero, la nokto de plenluno, Nao eliris sian ĉelon.

Oocuki vendis ne nur la domon, sed ĉiom da ĝia enhavo ĝis potoj kaj patoj. La nuro kio restis, estas la ŝtona manmuelieto, per kiu Nao iam ĉiunokte mueladis farunon por la kukoj kiujn vendadis la infanoj. Sen vivloko kaj eĉ

sen kuirilo, Nao estis devigata sendi la infanojn al aliloka zorgado, dum ŝi mem komencis vivi nefiksitan estadon, restadante ĉe la domo de Oocuki aŭ ĉe Hisako en Jagi. Dume, ŝi okupiĝis ordigante ĉifonojn, ŝpinante fadenon aŭ zorgante infanojn. Ŝi ankaŭ komencis kuraci malsanulojn per siaj preĝoj.

Tuj post sia liberiĝo, Nao ekkriis dum posediĝo ke venontjare ekestos granda milito inter Japanio kaj Ĉinio. Tiu aserto estis sekvata frue venontjare per ordono de Uŝitora no Kongĝin, ke ŝi iru al Ĉinio. Nao ne sciis ekzakte kie estas Ĉinio, sed obeeme ekiris, kaj kiam ŝi atingis al Kioto, Uŝitora no Kongĝin diris al ŝi ke ŝi povas reveni, ke li nur provis ĉu ŝi vere ekirus aŭ ne. Tiun jaron, 1894, Ĉinio-Japana milito ekis, la milito kiu postulis

la vivon de la dua filo de Nao, Seikiçi. La antaŭdiro de Nao efektiviĝis.

Post ne longe la novaĵo pri la spirita kapablo de Nao disvastiĝis, altirante la atenton de Kameĝiroo Oohaŝi, pastro ĉe Konkoo-Kjoo sanktejo en Kameoka. Intencante apliki ŝian kapablon por disvastigi la instruon de Konkoo-Kjoo, li sendis alian pastron de la sanktejo, Sadaĝiroo Okumura, al Ajabe, kie li invitis Nao resti en lia domo kaj ensanktejiĝi ŝian dion flanke de la dio de Konkoo-Kjoo. Laŭ la kresko de la reputacio de Nao, kredantoj komencis veni al la saktejo. Dume, Nao estis okupita pri lavado, kuirado, servado aŭ hakado de brulligno sur la montoj.

Rapide evidentiĝis ke Okumura malmulte interesiĝas pri Uŝitora no Kongin kaj nur ekspluatas Nao por pligrandigi la interesiĝon pri sia propra sekto, kaj post kelka tempo Nao foriris de Konkoo-Kjoo. La preĝoj de Okumura estis malgravaj kompare kun tiuj de Fondintino, kaj profunde humiligite li fine forkuris kaŝe en la mallumo. Alia pastro de la sekto persvadis al Nao reveni, sed post pli da malfacilaĵoj Nao nuligis sian konekton kun Konkoo-Kjoo por ĉiam. Tio estis en 1897, kiam Nao estis 60-jara.

Viro de la oriento

Kelkajn jarojn antaŭe, mistera antaŭdiro aperis en Fudesaki, dirante ke viro venos “de la oriento”, rekonos Uŝitora no Kongin kaj konigos lian mesaĝon al la mondo. Pro tio Nao petis al Hisako kaj ŝia edzo starigi teбудon en la ombro de la pinoj ĉe la vojflanko ekster Jagi, kie ili atendu la viron de la oriento.

Tuj venis ripozoj ĉe la budo juna viro kun nigritaj dentoj, vestita per malnovstila mantelo kaj portanta grandan valizon. Decidinte ke tio povas esti la viro kiun ili atendis, Hisako montris al li kelkajn skribaĵojn de Fudesaki, rakontis al li pri sia patrino, kaj invitis lin al Ajabe. La juna viro ŝajnis konsternita kaj impresita de kion li legis, kaj tiel, la 8an de oktobro 1898, li efektive renkontis Fondintinon por la unua fojo.

Li nomiĝis Kisaburo Ueda el Anao, nun parto de Kameoka. Montriĝis ke tiu viro estas praktikinta plezurabstinon en kaverno sur Takakuma-Jama, sankta monto proksima al Kameoka, dum la fino de la vintro de la sama jaro, kaj profunde entrance li tiam ricevis diecan ordonon iri al la nordokcidento, kie iu lin atendas.

Nao estis 61-jara kaj Kisaburo estis

27-jara kiam ilia unua renkontiĝo okazis. La juna viro restis du tagojn ĉe Fondintino antaŭ ol reveni al Sonobe, kie li tiam loĝis.

Unue ŝajnis ke nenio rezultiĝos el ilia renkontiĝo, sed Uŝitora no Kongin daŭre insistis en la skribaĵo, ke Ueda estas “tiu certa homo”, kaj ĉirkaŭ jaron poste Nao sendis unu el siaj sekvuloj, Heizoo Ŝikata, provi persvadi Kisaburo reveni al Ajabe. Sed unue la juna viro devis reveni al sia naskiĝvilaĝo, Anao, por informi al siaj patrino kaj avino pri sia intenco, kaj por preĝi ĉe la loka sanktejo pri gvido tra la venontaj tagoj. Li tiam rerenkontis Ŝikata en Sonobe kaj ili ekiris al Ajabe.

Profundiĝanta sento da fido markis la duan renkontiĝon inter Nao kaj Kisaburo, kaj la 1an de januaro, 1900, Kisaburo kaj Sumiko, la plej juna filino de Nao, geedziĝis antaŭ la altaro de Uŝitora no Kongin. Kisaburo Ueda ŝanĝis sian nomon al Onisaburo Deguĉi, la nomo kiun li poste famigis kiel kunfondinto de Oomoto kaj unu el la plej polemikaj figuroj de sia tempo.

Ĉapitro tria

Malfermo de Oŝima

Apud la duoninsulo Tango en Japana Maro, ĉirkaŭ dudek kvin mejlojn de la plej proksima haveno, estas malgranda neloĝata insulo nomita Oŝima. Laŭ populara tradicio, tiu estis la insulo de la palaco de la draka reĝo, reĝo de la maro, konata de ĉiu japana infano de la infaneja rakonto pri Uraŝima Taroo, kiu estis tien alportita surdorse de testudo kaj tie ricevis magian skatolon de la princino. Oŝima ankaŭ laŭkrede estis la scenejo de aliaj malpli konataj legendoj, kiel tiu de Koĝiki, pri la ĉasista dio kiu trovis la vojon al sorĉita insulo, serĉante la magian fiŝhokon perditan en la maro, kiu apartenis al lia frato, la fiŝkaptista dio.

La palaco de la draka reĝo estas ankaŭ tre grava por la budhismo: en la skribaĵo de Ŝinnran, fondinto de la sekto Ĵoodo Ŝinŝuu, oni povas legi ke en la finaj tagoj de senmoraligeo, kiam la instruo de Budho ne plu havas ian efikon en la mondo, estas en la palaco de la draka reĝo ke ĝi estos konservita.

Ordinaraj homoj ne povis facile

pilgrimvojaĝi al tiel sankta loko, kaj la superstiĉaj lokaj homoj kredis ekde antikva tempo, ke dum viro povas fari la vojaĝon unufoje dum sia vivo (sed estu avertata tiu kiu intencas duafoje viziti), inoj estis absolute malpermesataj paŝi sur la insulon. Malobeante tion, oni vekus la koleron de la princino de la draka palaco, la maro sovaĝiĝus, kaj ĉiaj monstroj kaj estuletoj aperus englutonte la inon tutan, lasante ŝiajn postulojn damnitaj dum ĉiuj venontaj generacioj.

La 4an de julio, 1900, Nao, tiam 63-jara, ekiris de Ajabe al tiu insulo, laŭ ordonoj de Fudesaki. Kun ŝi estis ŝia filino Sumiko kaj ŝia nova bofilo Onisaburo (la antaŭe nomita Kisaburo), Heizoo Ŝikata, kiu venigis Onisaburo reen al Ajabe, kaj alia sekvulo, Keitaroo Kinoŝita.

Je noktiĝo la kunularo atingis la havenon de Majzuru. Ili sukcesis lui boaton por veturigi ilin al Oŝima, kaj estis enboatiĝontaj kiam la ĉielo, kiu ĝis momento antaŭe estis serena, subite komencis kovriĝi de nigraj nuboj, dum la vento ekŝveligis muĝantajn ondojn. La boatisto taksis ke malica ventego venas, kaj decidis prokrasti la vesperan ekveturon. "Vi estus lasontaj vian vivon al la senkompato de la maro," li diris. "Atendu ĝis morgaŭ, kaj ni iru tiam, se la

vetero permesos."

La remistoj ankaŭ konsentis ke estus neeble ekiri, kaj ĉiu sin turnis for de la maro kaj ekiris hejmen. Nao, senatente pri iliaj avertoj, kriis kontraŭeme, "Tio ĉi estas dia ordono! Ni ne kuraĝas malfruiĝi eĉ je unu horo. Vi devas transveturigi nin tuj. La maro estas kruda ĉivespere ĉar la stabanaro de la draka reĝo venis de la palaco sub la maro por nin bonvenigi. Tio estas la kialo de la forta vento kaj tiu ĉi falanta pluvo. Ĉio estas enorda. Dio estas kun ni, do vi ne timu. Se vi remos ĝis Kabo Bakuĉi, la vento malfortiĝos, la pluvo ĉesos kaj la ondoj trankviliĝos. Ĉiukaze, ĉu ni vivos aŭ mortos dependas tute de la volo de Dio. Se Dio ne deziras ke ni mortu, kio ajn okazos ni estas tute sekuraj. Dio nun protektas nin, do ni ekiru tuj."

Kinoŝita sukcesis persvadi du fiŝkaptistojn, Iŭakiĉi Tanaka kaj Rokuzoo Haŝimoto, konataj pro sia lerteco pri boatumado, veni kun li al la marbordo. Sed kiam ili renkontis la aliajn el la kunularo de Nao, kiuj komencis peti ilin remveturigi ilin al Oŝima, la fiŝkaptistoj rigardis ilin nekredeme. "Malgraŭ kia dieca ordono estas, ni ne povas ekiri en ĉi tia vetero," ili diris. "Ĉiujn ĉi jarojn ni rigardis niajn boatojn niaj hejmoj, kaj en ordinare malbona vetero ni provus, sed

tio ĉi estas malsama. Kiu vi estas? Kutime estas ni kiuj volas ekiri kaj la klientoj kiuj plendas. Vi vere estas senzorga ularo, ĉu ne?”

Kinoŝita sin turnis al la fiŝkaptistoj kaj diris, “Nu, kiom ajn longe aŭ mallonge vi atingos aŭ ne atingos, ni pagos por la plena veturigo ĝis Oŝima, do bonvolu almenaŭ provi, kaj se vi ekvolos, vi povos reveni kiam ajn.”

Rigardante la honestajn vizaĝojn ĉirkaŭ ili, la fiŝkaptistoj diris, “Nu, vi tiel intencas ekiri, eble tamen estas dia ordono. Sen tia konvinkiĝo vi apenaŭ ŝatus ekiri dum vetero ĉi tia. Ni petu la gvidon de la dio de la insulo.”

Post tiu parolo, ili surpaŝis la boathaltejon, kaj fronte al Oŝima kunigis la manojn preĝe. Post loto por certiĝi pri la decido de la dio, ili sin turnis al Nao kaj la aliaj, duone trankviligitaj kaj duone timaj, kaj diris, “La dioj diras ke ni iru, do ni iru laŭeble al la celo.” Ili tuj pretigis boaton, enboatigis kvin pasaĝerojn kaj komencis remi el la haveno Majzuru, kantante maristajn kantojn je la pinto de siaj voĉoj, konkure kun la vento kaj pluvo.

Kiam la kunularo estis atingintaj la buŝon de la golfo, laŭ la aserto de Nao, la pluvo ĉesis, la ĉielo sereniĝis, la vento malfortiĝis kaj la fortaj ondoj trankviliĝis.

Baldaŭ la maro estis kiel spegulo, nur gnenita de la ondetoj de la boato, kovrita per arĝenta lumo de la stelbrileto.

Subite, post senpaŭza remado sur la trankvila maro, la fiŝkaptistoj ekkriis, “Tie antaŭe estas Oŝima!” De malproksime la kontentigita kunularo povis vidi Oŝima kiel nigran ombron obskurante la lunon. Ankaŭ la fiŝkaptistoj forgesis pri sia laceco, kaj ekremis eĉ pli forte.

Post nelonge, la orienta ĉielo komencis lumeti ruĝe dum la suno leviĝis, kaj baldaŭ la insulo Oŝima plenigis la scenon antaŭ ili, dum la matena koruso da birdoj plenigis la aeron. La insulo kiun atingis Nao kaj ŝia kunularo, estis loko de supera natura beleco, belega foliaro kaj sennombraj birdoj pipadantaj bonvenigan koruson.

Surmarbordiĝinte, Nao purigis sin sur la sablejo, kaj la aliaj imitis ŝin farante siajn sinlavojn. Ili iris honori la sanktejon surinsulan, farante oferaĵojn el la fruktoj de la tero, kaj recitis preĝojn por paco.

Post tiuj preĝoj, la kunularo ekforveturis de Oŝima. La maro estis ankoraŭ trankvila kiam ili remis reen al la ĉeflando, kaj la venontan matenon post reveno al Majzuru, ili ekiris piede reen al Ajabe.

kvina parto

KIO ESTAS VERA "MI" ?

1

DEGUĈI Hidemaru, tradukis ITOO Eizo

Korpo estas tubo por spiritaj fluoj

Korpo estas ujo por spirito. En diversaj okazoj lin okupas diversaj spiritoj kaj igas lin pensi diversajn aferojn kaj fari diversajn agojn kaj per tio lia memo kulturiĝas. Kiel nia korpo estas nutrata per la manĝaĵoj, kiujn ni prenas ĉiutage, tiel same nia animo nutriĝas per la spiritaj fluoj kiuj senĉese envenadas.

La homa koro estas vere ŝanĝiĝema: iafoje ĝi estas tiel nobla kaj pura, ke mi mem pensas min kvazaŭ Dio; alian fojon ĝi estas plenigita per tiel abomena, fanatika kaj malnobla penso, ke mi mem tute malestimas min.

La homa korpo estas por tiel diri vivanta tubo, tra kiu fluas spirito aŭ staras. Se la tubo ne estas en ordo la spirito ne povas traflui ĝin. Ni do devas ĉiam teni la tubon purigita por ne malhelpi la spiritajn fluojn.

Ofte oni eraras, pensante, ke la sama korpo estas la sama homo. La saman korpon okupas plej diversaj spiritoj laŭ la okazoj: jen eliras unu, jen eniras alia.

Ĉiu homo kun sama korpo havas pli ol tri fizionomiojn. Laŭ la spirito, kiu lin gardas nun, ŝanĝiĝas ne nur la fizionomio, sed ankaŭ sinteno kaj voĉtono.

Estas ankaŭ okazo, ke la saman homon okupas du spiritoj A kaj B miksite kaj kelkfoje laŭ diversaj proporcioj de la miksiĝo. Laŭ malsama spirito nature li ekhavas malsaman temperamenton kaj ricevas ankaŭ malsaman trakton de aliaj.

Kiel la radioelektro komuniĝas nur al la ricevilo aranĝita je sama ondolongo, tiel same responde al la teniĝo de homa koro venas al li ĝuste simpatiaj spiritoj. Sufero kaj plezuro ne estas ekstere.

Kiam la animo estas komunikita al malalta, malvasta spirita regiono, tiam la

koro ankaŭ estas iel malgranda, malvasta kaj malpura, sendemande kie troviĝas la korpo. Kontraŭe, kiam la animo komuniĝas kun alta kaj vasta spirita regiono tiam la koro estas agrabla kaj serena, sendemande la koron kaj tempon, en kiuj troviĝas la korpo.

En la okuloj de Dio tre supraĵaj estas pensoj de simpla unu homo, kiom ajn alte instruita li estu.

La homa korpo estas vivanta jaŝiro de Dispirito. Homo estas nur ilo por kompletigo de la universo. Homo kun maldensa spirito estas homo kun malgranda valoro. Afero, kiun homo faris kiam li estas kun maldensa Dispirito, ne eviteble montriĝas supraĵa. Kontraŭe, eĉ simpla, tute bagatela ago, farita kiam li estis en forta influo de Dispirito, portas neesprimeble profundan senco.

Malgraŭ ĉio, homo devas adori Dion, respektive dediĉi sian plejblon kiel ujo de Dio kaj labori por la kompletigo de la universo.

La plej altklasa ilo en la mondo estas la homo.

Ĉar homo estas la fina punkto de la spirita fluo, li ne rajtas pensi eĉ la plej bagatelan agon farita nur per sia propra kapablo.

La korpo estas la domo, la animo

estas la loĝanto. Fariĝas bona laboro, kiam harmonias la domo kaj la homo.

Gardospirito, vic-gardospirito, malbona spirito

Kio estas la homo? Ĉi tio estas treege malfacila demando. Ekzemple primeditu: "Kio mi estas?" Kio ŝajnas memkomprenebla kaj tamen efektive estas neniel komprenebla, tio estas "mi".

Ĉar la spiritoj havas la econ tute libere kuniĝi aŭ disiĝi, ili estas finfine unu laŭ la vasta senco de la vorto, dum la malvasta vidpunkto ĉiu el ili estas aparta respektive. Tial oni povas diri, ke ekzistas neta "mi" laŭ unu vidpunkto sed samtempe tia ne ekzistas laŭ alia vidpunkto.

Ĉiam okazas kuniĝo aŭ disiĝo de spiritoj. Do, kvankam la primara animo de iu homo estas senŝanĝa, identa dum la tuta vivo, ne definitivaj estas liaj gardospiritoj.

La kuniĝo de la primara animo kun la primara gardspirito estas lia "memo", kaj la enhavo de la "memo" ŝanĝiĝas iom post iom. Principe la primara gardspirito apartenas al la sama linio kun la primara animo, sed kelkafoje okazas, ke provizore venas gardspirito el tute kontraŭa linio por korekti malbonan flankon de la primara animo.

Kiam la primara animo komplete harmoniiĝas kun la primara gardspirito el la Dia regiono, okazas la tiel nomata “unueciĝo de Dio kun homo”. Kontraŭe, kiam lia primara animo harmoniiĝas kun gardspirito el la regiono de malbona spirito, (tiel nomata vic-gardspirito) tiam li eniras en staton de malbono.

Multaj homoj estas iafoje en la stato de bono kaj alifoje en la stato de malbono. Sed troviĝas ankaŭ tiuj, kiuj estas ĉiutage kaj tutan tempon en la stato de bono pro sindisciplinado, dum aliflanke troviĝas, kvankam ne ofte, tial homoj kiuj restas dum tuta vivo en la stato de malbono pro degeneriĝo de la primara animo.

La primara animo de iu homo estas parto de iu Dispirito sendita al la fizika mondo. Kiam ĝi enloĝiĝas en la homan korpon, ĝi estas kondensita, kiel la semo de planto.

Kiel sama semo bone ekĝermas kaj sane kreskas aŭ ne laŭ la tempo kaj loko de enteriĝo, tiel same unu sama parto de Dispirito estas submetita sub la regadon de diversaj medioj de la fizika mondo siatempaj.

La primara animo estas komparebla kun mastro de unu hotelo kaj tiel same la korpo kun la domo.

La gardspirito estas la gvidanto de la mastro. Ĝi originale loĝas en la spirita mondo kaj faras gravan instrukcion kaj gvido

al la mastro pro diversaj kialoj ankoraŭ unu difinita spirito konstante loĝas en la hotelo. Ĝin oni nomas vic-gardspirito.

La primara gardspirito estas la patro de tiu mastro aŭ la origino, el kiu li elvenis. La rilato inter la gardspirito kaj la memo (primara animo) similas al la rilato inter la cerbo kaj la nervosistemo. La plej neta praorigino de la memo estas la primara gardspirito kaj por inverse diri, la etendiĝo aŭ branĉiĝo de la primara gardspirito estas la memo. Do oni povas diri, ke la primara gardspirito estas memo.

Kvankam ŝajnas, ke sufiĉas nur unu primara animo por unu homo, ordinare homoj krome havas gardspiriton kaj vic-gardspiriton, eĉ kelkaj vic-gardspiritojn iufoje.

Dum la gardspirito estas bonkvalita, ĉar ĝi esence estas helpanto al la primara animo, la vic-gardspirito estas malbona spirito, kiu nur klopodas tenti la primaran animon en malbonon.

La vera memo estas la primara animo de ĉiu homo, eĉ de plej malbona homo, estas naskita el la pura spirito de la universo, do ĉiu respektive havas sian brilon. Tamen intertempe pro diversaj kaŭzoj ĝi perdas sian brilon kaj forpuŝata de la malbona spirito, kiu entrudis sin en la korpon, fine enfermiĝas en malvasta angulo tiel ke ĝi ne povas dece elmontri sian kapablon. Anstataŭ ĝi ofte la

malbona spirito okupas la mastrecon ĝis tia grado, ke la gardospirito, nome la vartistino jam nenion povas helpi.

La memo (primara animo) estas parto aŭ eldividiĝo de iu ĉielulo (primara gardospirito) aŭ iu spirito. Ĝi harmoniiĝas kun la vic-gardospirito pro la neceso de la fizika monda vivado kaj aliflanke ĝi harmoniiĝas kun la gardospirito por eniri en la spiritan ordon.

Ĝenerale la memo kiu aperas kiel unu personeco estas en tiu stato de harmoniiĝo kun la gardospiritoj.

La memo harmoniiĝas ne ĉiam kun difinitaj gardospirito kaj vic-gardospirito. Iafoje ĝi povas harmoniiĝi kun pluraj gardospiritoj. (Kvankam ne eble kun spiritoj sen ia rilateco.) En tiu okazo unu korpo sendube elmontras plurajn personecojn.

Ĉar estas diversaj gradoj de la harmoniiĝo, konsekvence aperas diversaj statoj de la elmontriĝo personeca.

Kiam la memo harmoniiĝas kun iu spirito, tiam ekzistas nur unu "memo" por ambaŭ, memo kaj la spirito, nur dum la daŭro de la harmoniiĝo. La memo, antaŭ la harmoniiĝo kun la spirito, restas nur nebule en la memoro.

Tiel tre vigle okazas, harmoniiĝo kaj disiĝo de spiritoj, sed tamen nur tre malofte okazas, ke stultulo subite fariĝas granda saĝulo aŭ granda verulo abrupte falas en

stultulon, ĉar la pli aŭ malpliriĉiĝado de la animo okazas nur iom post iom laŭ difinita ordo (malofte, sed ne neniam).

La mondo progresas pli kaj pli delikaten kaj detalen kaj tial ju pli antikve, des pli grandan laboron povis elmontri unu individua persono.

La rilato inter la primara gardospirito kaj la primara animo similas tiun inter centra butikoj kaj agentejoj. Kiam okazas vigla helpo de la primara gardospirito, tiom pli grandiĝas la primara animo; sekve la konduto kaj la fizionomio de tiu persono fariĝas pli noblaj, riĉaj kaj graciaj, ol en ordinaraj tagoj.

Kiam oni dissendas sian primaran animon al diversaj direktoj, (kiam homoj estas en aflikto, lia animo disflugas kaj malgrandiĝas,) tiam konsekvence la aktiveco de la korpo ankaŭ malgrandiĝas.

Estas diversaj kaŭzoj de pli- aŭ malpligrandiĝo de la forto de la animo. Kiel la tirforto de iu magneto proporcias al ĝia originala forto, tiel la homa animo povas montri pli aŭ malpli grandan potencon proporcie al sia forto. (Kvankam la magneto konstante havas saman forton) la homa animo mem povas iugrade pli aŭ malpligrandigi sian forton. Kiam la animo sentas ĝojon, tiam ĝi pli grandiĝas aŭ fortiĝas kaj inverse.

Tial homo devas atenti kiel ne turmenti sian koron sed teni ĝin ĉiam en

plena trankvileco.

Ĉiu penso venas el la spirito. Homo malĝojas, kiam lin okupas malĝoja spirito; homo ĝojas, se lin regas ĝoja spirito.

En homa korpo kunloĝas almenaŭ tri spiritoj diversaj. Kvankam la homa primara animo kaj la gardospirito estas esence bonaj, la ceteraj vic-gardospiritoj estas malbonaj. Kiam ĉi tiuj lastaj ekhavas potencon por disponi la korpon, la korpo neeviteble enfalas en malbonon. Sed la primara animo kaj la gardospirito ĉiam batalas kontraŭ ili por superregi la korpon. Jen kial la homo havas konsciencan kaj koron kontraŭan al ĝi. La homo naskiĝis en ĉi tiu mondo kun la destino, ke ĝi klopodu por la triumfo de la konscienco dum la vivo.

Dum la vic-gardospiritoj ĉiam avide serĉadas la ŝancon kontentigi sian deziron. Se homo montras eksterordinare fortan seksdeziron aŭ avidemon pri manĝaĵo, tio evidente estas kaŭzita de la furiozo de la vic-gardospiritoj. Krome, koleremo, deprimiĝemo, suspektemo—ĉiuj ĉi tiuj emoj venas de vic-gardospiritoj. Do, homo devas ĉiam introspekti por kontroli ilin.

Sed tre forta vic-gardospirito iafoje malhelpas eĉ la de Dio dotitan aktivecon de la primara animo kaj utiligas por si la homan racion aŭ la konsciencan. Ĉiukaze homo devas nepre subteni la vic-gardospiritojn dum la vivo por proprigi al si la temperamentojn

de la ĉielregno.

La korpo estas ujo. En ĝi loĝas ne nur la primara animo, sed ankaŭ spirito, kiu gardas la vivtenon kaj aktivecon de la korpo, kaj kiu tamen kapablas nur fari tion sed nenion pli. Do, ĝi estas nomata vic-gardospirito.

Se ĝi progresas, liberigita de la korpaj katenoj kaj de la egoisma karaktero, ĝi rajte nomiĝas gardospirito, senigita je la prefikso "vic".

Mi menciis tri kategoriojn, nome: primara animo, gardospirito kaj vic-gardospirito. Sed tiu distingo laŭ proksimuma, malpreciza konsidero. Oni povas distingi en kiom ajn multe da kategorioj, se oni ŝatas precizecon.

Post ĉio, ĉar la korpo estas sub rekta regado de la vic-gardospirito, ĉiu korpa percepto venas rekte de la vic-gardospirito. Laŭ la grado de puriĝado de la vic-gardospirito ŝanĝiĝas ankaŭ la grado de lia korpa percepto.

Por ke tereca spirito (vic-gardospirito) progresu al ĉieleca spirito ĝi devas plenumi eksterordinaran disciplinadon. Se en la mondo naskiĝas diversaj malfeliĉoj kaj bonaj homoj spertas multajn malfacilaĵojn, tio okazas iusence kiel fajro kaj akvo, per kiuj la vic-gardospiritoj sin forĝu kaj purigu por dece sin levi ĉielen.

La vic-gardospirito estas kristaliĝo de memalkroĉiĝo. Ĝi estas egoismo mem. Ĝia penso estas malvasta kaj estas ĉiam bazita sur memprofito. Ĝi konsideras nur en la kadro de parteto kaj provizoreco. Kaj neniu homo estas sen vic-gardospirito.

La karakterizaĵo de la vic-gardospirito estas ekstrema egocenteco. Mi ne scias pri aliaj homoj, sed mi tion asertas per la konstanta introspektado pri la pensoj el mia propra vic-gardospirito.

Homo, regata de la vic-gardospirito, ĉiam bedaŭras nur sian malsuperecon al alia kaj tute ne havas la grandanimecon juste juĝi aferon nete laŭ ĝia valoro. Tial li tuj volonte, ne pro justeco, aprobas aferon, kiu ŝajnas porti profiton al li, kaj simple evitas tion, se ĝi iel kontraŭas lian bonon, senkonsidere pri ĝia vera esenco.

La plejparto da nuntempaj homoj estas regataj de la vic-gardospirito kaj sekve, al mi ŝajnas, aprobas la egoismon, kiel naturon de homo.

Homo sub vic-gardospirito malŝatas, ke aliaj superas lin en iu ajn, eĉ plej bagatela afero. Li tamen tuj flatas iun, kiun la publiko jam respektas, ĉar tio sendube portos profiton al li.

Pro ekstrema egoismo li tuj suspektas aŭ ĵaluzas je plej bagatela konduto de alia persono. Suspekto, ĵaluzo, rankoro – ĉiuj ĉi tiuj sentoj estas el la vic-gardospirito.

Ili preskaŭ ne troviĝas en la Dia regno, mi kredas.

La homa korpo, por tiel diri, estas tre grava ponto, tra kiu dioj el la ĉielo malsupren venas sur la teron kaj diversaj spiritoj en disciplinado sin levas ĉielen. La gardospirito de ponto estas “mi”, dum la gardospirito estas gasto malsupren venanta el la ĉielo kaj la vic-gardospirito estas gasto supren iranta de la tero.

“Mi” ricevas diversajn instruojn kaj poluradon de ambaŭ gastoj.

Estas bonaj spiritoj kaj malbonaj spiritoj. Eĉ inter malbonaj spiritoj troviĝas iuj, kiuj havas grandan potencon.



Nun, la DVD estas atente rigardata de e-istoj en monda Esperantujo!

La tre konata e-isto, s-ro Roman Dobrzynski en Pollando, kiu prezentis al la esp-istoj en la mondo la filmon pri la agadoj de Oomoto kun la titolo "Japana Printempo – Oomoto 2009 ", gajnis la 1-an premion en la Belartaj Konkursoj de UEA por la jaro 2011. Poste oni povas apreci la filmon, aĉetante ĝian DVD-n por 1,000 enoj ĉe UEA kaj Esperanto-Populariga Asocio (EPA).

— Kial vi elektis Oomoton kiel la temon?

En 2009 dum kelkaj monatoj mi gastis ĉe Oomoto, invitite por studi kaj eventuale verki libron pri tiu movado-religio tiel forte ligita kun Esperanto. Ravis min la japana printempa sezono, ĝiaj bunteco, ekzotiko, facinaj festoj kaj ankaŭ ĉiutagaj eventoj interne de Oomoto. Ĉio ĉi estis filminda. Ĉar mi hobie kutimas kunporti filmkameron, kolektiĝis dekunu horoj da bildoj. Foje mi revuis la bendojn kaj konstatis, ke ili entenas materialon por interesa filmo.

— Kaj vi faris dokumentan filmon pri Oomoto.

Ne estis mia intenco fari pri Oomoto prelegon ilustritan per bildoj, sed prezenti personajn impresojn pri mia estado en Japanio.

— Kiel vi tie interkompreniĝis?

Ekskluzive en Esperanto. Tuj post la alveno al la Oomoto-centro en Kameoka mi vizitis banejon kaj sidiĝis en ampleksa kuvo kun varma akvo, el kiu elstaris kelkaj nigraharaj kapoj. Imagu mian miron, kiam tiuj kapoj alparolis min en Esperanto. Tio konsciigis al mi, ke Oomoto estas tutmonde rara neesperantista institucio, en kiu eblas konstante uzi Esperanton. Ĝis la fino de mia restado kelkdeko da personoj surprize alparoladis min en Esperanto.

(El "Tempo por kino " sur januara numero de "Esperanto" en 2012, la oficiala organo de UEA)

Prezo: 1,000 enoj

Tiuj, kiuj aĉetos pli ol 5 ekzemplerojn de tiu DVD, la sendkosto estas senkosta.

La NTSC-sistemo funkcias en Usono kaj Japanio, kaj la PAL-sistemo funkcias en Eŭropo. Bonvolu nepre indiki la sistemon.

Mendu al Esperanto-Populariga Asocio

Tenon-kjo, Kameoka-ŝi, Kioto-hu, 621-8686

Tel: 0771-56-9074 ; Telefakso:0771-25-0061

Retadreso: officejo@epa.jp

